

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE



Pri la laponoj, interesa nomada popolo en norda Svedujo,
D-ro F. Szilágyi rakontas en artikolo sur p. 181—183.

N:r 11.
N-o 11.

November 1933.
Novembro 1933.

Pris 25 öre.
Prezo 25 oeroj.

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

Redaktör: Bernhard Eriksson.
Postadr.: Biblioteksgat. 30, Stockholm.
Tel. 10 53 27, 11 27 53.

Prenumerationspris: Helt år kr. 2:50.
Lösnummer 025.

Annonsspris: 15 öre pr mm.
Utkommer en gång i månaden.

SVEDA ESPERANTO-GAZETO

Redaktanto: Bernhard Eriksson.
Adreso: Biblioteksgatan 30, Stockholm.
La administracio: Box 698, Stockholm.

Anonco pri korespondado kostas
2 respondkuponojn.
Abono eksterlanda: 1 jaro 3:— sv. kr.

Svenska Esperanto-Förbundet (Sveda Esperanto-Federacio)

Adress: Stockholm 1.
Sekretariatets adress: Fredsgatan 4.
Postgirokonto N:r 2012.
Arsavgift för direkt anslutna medlem-
mar kr. 5:— inberäknat pren.-avgiften
för Svenska Esperanto-Tidningen.
Ordförande: Paul Nylén, Huddinge.
Telefon: Huddinge 279.
Skr.: Ernfrid Malmgren, Heleneborgs-
gat. 6, Stockholm. Tel. 41 03 04.

Svenska Esperanto-Institutet

Postadr.: Box 698, Stockholm.
Postgiro 515 11.
Avd. för examens- och språkfrågor: Rek-
tor Sam Jansson. Tel. Lidingö Villa-
stad. 295. — Avd. för ekonomi, statistik,
kurser: E. Malmgren.

Sv. Lärares Esperanto-Förbund (Sveda Instruista Esperanto-Federacio)

Ordfr.: Thorsten Torbjär, Mariagat. 15,
Göteborg.
Skr.: Gustav Rimberth, Kommendörs-
gatan 41, Göteborg.
Kassör: Oskar Svantesson, Karl Johans-
gatan 61, Göteborg.
Arsavgift 2:— kr.

Läroböcker, Ordböcker

m. m.

Systematisk kurs i Esperanto. Av
Seppik-Malmgren. En enkel och
lätt lärobok för nybörjare... 0:75

Esperanto utan förkunskaper. Av
Harald Skog o. Sam Jansson. 0:50

Övningsbok till d:o. 0:50

Praktisk lärobok i Esperanto för
kurser och självstudium. Rik på
förklarande exempel. 2:—

Kurs i Esperanto. Del I. Av Fritz
Lindén. Synnerligen enkel. .. 0:90

D:o. Del II. Läsebok. 0:90

Lärobok i Esperanto för A.B.F. och
andra studiecirklar. Av Jan Mas-
siak. Inb. 2:50

Kommentarer till d:o. 1:—

Esperanto-Kurso. Av V. Setälä. En
enkelt och trevligt läsebok. Ill. 0:50

Esperanto-Grammatik. Av Lärov-
adj. Nils Nordlund. 1:50

Nyckel till Esperanto. Miniaturläro-
bok med ordlista. 0:10

Dubbel Fickordbok i Esperanto. Av
Carl Ohlsson. Svensk-Esperantisk
o. esperantisk-svensk ordbok. 1:50

Esperantisk-svensk Ordbok. Av P.
Nylén. 232 sid. Häft. 3:75

D:o, inb. i hållbart klotb. 5:—

Svensk-Esperantisk Ordbok. Av G.
H. Backman. För tillf. slutsåld.

Esperanto-Ordbok. Av N. Nordlund.
1:—

Prepositionerna i Esperanto. Av N.
Nordlund. 0:75

Fundamenta Krestomatio. Av D:r L.
L. Zamenhof. Läsestycken avsedda
att utgöra mönster för god espe-
rantostil. 3:25

Dialogoj en Esperanto. Por kursoj
kaj grupaj kunvenoj. Av Einar
Dahl. 32 sid. 0:50

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.

Box 698, Stockholm 1. Postg. N:r 578.
Tel. 31 65 01.

Kont. o. exp.: Sveavägen 98 5 tr. Kl. 9-17.

Order överst. 10 kr. försänd. portofritt.
Vid ins. av förskottslikvid för mindre
order bif. 10 proc. till portokostnader.
Fullständig prislista på begäran gratis
och franko.

ESPERANTO-TIDNINGEN

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

SELMA LAGERLÖF, ne nur en Svedujo sed en la tuta mondo fama verkistino, gajninto de Nobela literatura premio, festas en novembro sian 75-jaran datrevenon. Okaze de tio ni prenas la ĉi apudan ĉapitron el unu el ŝiaj plej famaj verkoj "La fabelo de Gösta Berling", kiu romano cetero en la plej proksimaj monatoj aperos ĉe Eldona Societo Esperanto, Stockholm. La tradukon jam faris nia konata esperantoverkisto Stellan Engholm.

Eroso, ĉionreganta dio, vi ja scias, ke ofte ŝajnas, kvazaŭ homo estus liberiginta sin de via potenco. Ĉiuj dolĉaj sentoj, kiuj kunligas la homojn, ŝajnas mortintaj en lia koro. La frenezo etendas siajn ungegojn al la malfeliĉulo, sed tiam vi venas kun via ĉiopovo, vi ŝirmestro de la vivo, kaj kiel la bastono de la forta sanktulo refloras la sekiginta koro.

Neniu estas pli avara ol la pastro en Broby, nenium malbono kaj malkompato pli izolas de la homoj. Liaj ĉambroj ne estas hejtitaj en la vintro, li sidas sur nepentrita ligna benko, li vestas sin per ĉifonoj, nutras sin per seka pano kaj furiozas, kiam almozulo eniras tra lia pordo. Li lasas la ĉevalon malsati en la stalo kaj vendas la fojnon, liaj bovinoj rodas la sekan herbon ĉe la vojrandoj kaj la muskon sur la muro de la domo.

La pastro de Broby.

Ĝis la ŝoseo oni aŭdas la blekadon de la malsataj ŝafoj. La kamparanoj donace ĵetas al li manĝaĵon, kiun iliaj hundoj ne manĝas, vestojn, kiujn iliaj malriĉuloj ne akceptas. Li etendas sian manon por peti, li klinas sian dorson por danki. Li petas almozojn de la riĉulo, pruntas al la malriĉuloj. Se li vidas moneron, lia koro doloras pro maltrankvilo, ĝis la monero troviĝas en lia poŝo. Malfeliĉa estas tiu, kiu ne staras preta antaŭ li en la pagotago.

Malfrue li edziniĝis, sed pli bone estus, se li neniam estus farinta tion. Turmentita kaj laborelĉerpita mortis lia edzino. Nun lia filino servas ĉe fremduloj. Li maljuniĝas, sed la aĝo ne donas faciligon en lia penado. La frenezo de avaro neniam forlasas lin.

Sed iun belan tagon en la komenco de aŭgusto venas supren sur la deklivo de Broby peza kaleŝo, tirata de kvar ĉevaloj. Nobla maljuna fraŭlino alveturas kun granda pompo, kun veturigisto kaj lakeo kaj ĉambristino. Ŝi venas por renkonti la pastron de Broby. Lin ŝi amis en la tagoj de sia junaĝo.

Ili amis unu la alian, kiam li vivis kiel guvernisto, sur la bieno de ŝia patro, sed la fiera parencaro disigis ilin. Kaj nun ŝi veturis supren sur la deklivoj de Broby por vidi lin, antaŭ ol ŝi mortos. Revidi la amaton de la junaĝo estas ĉio kion la vivo povas doni al ŝi.

La nobla malgranda fraŭlino sidas en la granda veturilo kaj revas. Ŝi ne veturas sur la deklivoj de Broby al malriĉa dometo de subpastro. Ŝi veturas al la freŝa, densa laŭbo en la parko, kie atendas la amato. Ŝi vidas lin, li estas juna, li scias kisi, li scias ami. Nun, kiam ŝi scias, ke ŝi vidos lin, lia bildo aperas antaŭ ŝi mirinde klara. Kiel bela li estas, kiel bela! Li scias revii, li scias bruli, li plenigas ŝian animon per ekstaza fajro.

Nun ŝi estas flave pala, velkinta kaj maljuna. Eble li ne rekonos ŝin, la sesdekjarulinon, sed ŝi ne venas por esti vidata, sed por vidi, por vidi la amaton de la junaĝo, kiun la aĵoj de la tempo ne difektis, kiu ankoraŭ estas juna, bela, korvarma.

Ŝi venas el tiom malproksima loko, ke ŝi ne aŭdis eĉ unu vorton pri la pastro de Broby.

Radbruas la kaleŝo veturante supren sur la deklivoj, kaj sur la krutaĵo la pastrodomo estas videbla.

"Pro la Dia kompatito," ĝemas almozulo ĉe la vojrandoj, "moneron al malriĉa homo!"

La nobla sinjorino donas al li arĝentan moneron kaj demandas, ĉu la pastrodomo troviĝas proksime.

La almozulo direktas la ŝi ruzan, akran rigardon.

"La pastrodomo kuŝas tie," li diras, "sed la pastro ne estas hejme, neniue estas hejme en la pastrodomo."

La delikata malgranda fraŭlino ŝajnis tute forpaliĝi. La freŝa laŭbo malaperas, la amato ne estas tie. Kiel ŝi povis pensi, ke ŝi nun, post kvardekjara atendo, retrovos lin tie?

Kion la fraŭlina moŝto volas en la pastrodomo?

La fraŭlina moŝto venas por renkonti la subpastron. Ŝi konis lin en pasintaj tagoj.

Kvardek jaroj kaj kvardek mejloj disigis ilin. Kaj dum ĉiu mejlo, per kiu ŝi proksimiĝis, ŝi forveturis unu jaron kun ĝia ŝargoo de malĝojo kaj memoroj, tiel ke ŝi nun alveturante al la pastrodomo ree estas dudekjarulino, sen malĝojo, sen memoroj.

La almozulo rigardas ŝin, vidas ŝin antaŭ siaj okuloj transformiĝi de dudek ĝis sesdek jaroj, kaj ree de sesdek ĝis dudek.

"La pastro revenos posttagmeze," li diras. La fraŭlina moŝto farus plej bone,

se ŝi veturus al la gastigejo de Broby kaj revenus posttagmeze. La almozulo asertas, ke la subpastro tiam estos hejme.

En la posta momento la peza kaleŝo kun la velkinta sinjorineto ruliĝas mal-supren sur la deklivoj al la gastigejo, sed la almozulo staras tremanta kaj postrigardas ŝin. Ŝajnas al li, ke li volus ekgeni por kisi la radsulkojn.

Belvestita, novrazita kaj polurita, en ŝuoj kun brilaj bukoj, kun silkaj ŝtrumpoj, kun krispkolumo kaj manumoj la pastro en Broby tagmeze en la sama tago staras antaŭ la edzino de la ĉefparohestro en Bro.

»Nobla fraŭlino,« li diras, »filino de grafo, via sinjorino moŝto! Ĉu vi kredas, ke mi, malriĉa homo, povas peti ŝin eniri al mi? Miaj plankoj estas nigraj, mia salono sen mebloj, la manĝoĉambra plafono estas verda de ŝimo kaj mucido. Helpu min, sinjorino! Pripensu, ke ŝi estas nobla filino de grafo!«

»Sciigu, ke vi forvojaĝis!«

»Kara sinjorino, ŝi veturis kvardek mejlojn por vidi min, malriĉan homon. Ŝi ja ne scias, kiel estas ĉe mi. Mi ne havas liton, kie ŝi povas dormi. Mi ne havas liton por ŝiaj geservistoj.«

»Nu, lasu ŝin reveturi!«

»Sed kara sinjorino! Ĉu vi ne komprenas, kiel mi pensas? Prefere mi fordonus ĉion, kion mi posedas, ĉion, kion mi per diligento kaj peno kolektis, ol ŝi forveturu sen akcepto sub mia tegmento. Ŝi estis dudekjara, kiam mi vidis ŝin lastfoje, kaj de tiam nun pasis kvardek jaroj, pripensu tion, sinjorino! Helpu min, por ke mi povu akcepti ŝin! Jen estas mono, se mono povos helpi, sed tie ĉi oni bezonas pli ol monon.«

Ho, Eroso! La virinoj amas vin. Prefere ili iras cent paŝojn por vi ol unu por aliaj dioj.

En la ĉefparohestra domo de Bro oni malplenigas la ĉambrojn, malplenigas la kuirejon, malplenigas la provizejon. Ĉe la ĉefparohestra domo en Bro oni plenŝargas la laborveturilojn kaj veturigas ilin al la subpastra domo. Kiam la ĉefparohestro revenos de la instruado al konfirmotoj, li iros en malplenajn ĉambrojn, malfermetos la kuirejan pordon por demandi pri sia tagmanĝo sed trovos neniun tie. Nek tagmanĝon, nek sinjorinon, nek servistinon! Kiu estas kulpa? Eroso tiel volis, Eroso, la ĉionreganto.

La nova Stokholmo:
Vendplaco Hötorget
kaj Koncerta domo.



Jen en posttagmezo la peza kaleŝo radbruas veturante supren sur la deklivoj de Broby. Kaj la malgranda fraŭlino demandas sin, ĉu ne okazos nova malfacilaĵo, ĉu efektive estas vero, ke ŝi nun iras por renkonti la solan ĝojon de sia vivo.

Jen la kaleŝo flankenveturas al la pastroĉdomo, sed en la pordega volbo ĝi haltas. La granda veturilo estas tro larĝa, la pordego tro mallarĝa. La veturigisto klakas per la vipo, la ĉevaloj ektiras, la lakeoj blasfermas, sed la postaj radoj de la kaleŝo restas nemoveble fiksitaĵ. La grafilino ne povas enveturi sur la korton de la amato.

Sed jen venas iu, jen venas li! Li levas ŝin el la veturilo, li portas ŝin sur brakoj, kies forto estas nerompita, ŝi estas premata en ĉirkaŭbrako same varma kiel iam, antaŭ kvardek jaroj. Ŝi rigardas en okulojn, kiuj brilas, kiel ili brilis vidinte nur dudekkvin printempojn.

Kaptas ŝin ŝtormo de sentoj pli varmaj ol iam antaŭe. Ŝi memoras, ke li

iam portis ŝin supren sur la ŝtuparo al la teraso. Ŝi kredis, ke ŝia amo vivis dum ĉiuj tiuj jaroj, tamen ŝi forgesis, kion signifas ĉirkaŭpreno de fortaj brakoj, kion signifas rigardi en junajn, radiajn okulojn.

Ŝi ne vidas, ke li estas maljuna. Ŝi vidas nur la okulojn, la okulojn.

Ŝi ne vidas la nigrajn plankojn, la mucide verdajn plafonojn, ŝi vidas nur liajn radiajn okulojn. En tiu momento la pastro de Broby estas pompa viro, bela sinjoro. Li beligas de la nura rigardo al ŝi.

Ŝi aŭdas lian voĉon, lian klaran, fortan voĉon, karese ĝi sonas. Tiel li parolas nur al ŝi. Por kio li bezonis meblojn el la ĉefparoĥestra hejmo por siaj malplenaj ĉambroj, por kio manĝaĵon, por kio servistojn? La maljuna fraŭlino certe ne sentus la mankon de tio. Ŝi aŭdas lian voĉon kaj vidas liajn okulojn.

Neniam, neniam antaŭe ŝi estis tiel feliĉa!

Kiel gracie li klinas sin, gracie kaj fiere, kvazaŭ ŝi estus dukino kaj li la

feliĉa favorato! Li uzas la multajn frazojn de la malnova tempo, kiam li parolas al ŝi. Ŝi nur ridas kaj estas feliĉa.

En la vespero li proponas al ŝi la brakon, kaj ili promenas en lia malnova neprizorgita ĝardeno. Ŝi vidas nenion malbelan aŭ neflegitan. Sovagiĝintaj arbustoj fariĝas tonditaj heĝoj. La fikreskaĵo kuŝas kiel glataj, briletantaj herbotapiŝoj, longaj aleoj ombras ŝin, kaj en niĉoj de krepusketa verdaĵo brilas blankaj statuoj de juneco, de fidelo, de espero, de amo.

Ŝi scias, ke li edziĝis, sed ŝi ne memoras tion. Kiel ŝi povus memori ion tian. Ŝi havas dudek jarojn, li dudek kvin. Vere li estas nur dudekkvinjara, juna kun ŝveligantaj fortoj. Ĉu estas li, kiu fariĝos la avara pastro de Broby, li, la ridetanta junulo? Foje susuras ĉe lia orelo flustro pri mallumaj sortoj. Sed la ĝenoj de malriĉuloj, la malbenoj de trompitoj, la pikvortoj de malestimo, la ridindigaj kantoj, la moko, tio ankoraŭ ne ekzistas por li. En lia koro flamas nur pura kaj senkulpa amo. Ne estas eble, ke la fieraj junulo iam amos la oron tion, ke li rampe serĉos ĝin en la plej aĉa koto, petos ĝin de vojirantoj kaj suferos humiligon, malŝaton, malvarmon

kaj malsaton por ekhavi ĝin? Ĉu li malsatigos sian infanon, turmentos sian edzinon pro la sama aĉa oro? Ne estas eble. Tia li ne povas esti. Li estas bona homo kiel ĉiuj aliaj. Li ne estas monstro.

La aminto de lia junaĝo ne iras apud malestimata aĉulo, neinda por la ofico, kiun li kuraĝis akcepti! Tion ŝi ne faras.


Ho, Eroso, ĉionreganta dio, ne en tiu ĉi vespero! En tiu ĉi vespero li ne estas la pastro de Broby, nek morgaŭ nek postmorgaŭ.

La postan tagon ŝi forveturas. La pordego estas plilarĝigita. La kaleŝo ruliĝas malsupren sur la deklivoj de Broby tiom rapide, kiom ripozintaj ĉevaloj povas kuri.

Kia revo, kia belega revo! Dum tiuj tri tagoj eĉ ne unu nubeto!

Ridetante ŝi reveturis al sia kastelo kaj siaj memoroj. Ŝi poste neniam aŭdis lian nomon, ne faris demandojn pri li. Ŝi volis rerevi tiun revon ĝis la fino de sia vivo.

En sia soleca hejmo sidis la pastro de Broby kaj ploris kiel senesperulo. Ŝi reunigis lin. Ĉu li nun remaljuniĝos? Ĉu la malbona spirito revenos, kaj li fariĝos malŝatinda, malŝatinda, kiel li antaŭe estis?



La nova Stokholmo: El la korto de Urba domo.

Letero al mia onklino.

F. Szilágyi.

Semajnfino en la norda arkto.

Kara Onklino,

Jam pasis kelke da monatoj depost mia lasta letero, sed nun Vi denove aperis en mia konscienco. Vi plendis, ke vi jam delonge ne aŭdis pri via nevo kaj speciale ne pri la norda nacio, kies dolĉan panon — (ĉar la pano de Svedlando estas dolĉa) — mi nuntempe diligente manĝadas.

Nu, kara Onklino, pri kio mi raportu al vi, eble interesas vin mia lasta "viken-do" en la proksimo de la norda arkto? Ĉu vi konsentas? (Vi estas unika virino, vi ĉiam konsentas.)

Jaŭde posttagmeze ankoraŭ mi promenis en Stockholm kaj propramane mi donis avelon al la sciuroj en la idilia Stureparko, — ĉu vi kredas, ĉu ne, — tiuj ĉi estaĵetoj, kiuj en la tuta mondo estas timemaj, vivas ĉi tie meze de la grandurbo kaj se oni montras al ili avelon, tuj ili kuras por forpreni ĝin. Ne, ne en zoologia ĝardeno, sed en publika parko ili vivas, por esti simbolo de la stockholm-a bonkoro kaj mildeco, tie ili rondkuras, saltadas, eĉ mi vidis propraokule, kiam unu el la plej bonhumoraj, forŝiris la novaĵ-afiŝeton de iu gazeto, kies plej okulfrapa vorto estis: *la krizo*. La sciureto forkuris kun *la krizo*. Ĉu ne estas simbolo? Kaj jaŭde vespere mi sidis en la opero kaj plezurplene mi aŭdis kaj vidis la ĉarman balet-prezentadon de la »Boutique fantasque« — la prezentado estis unuaranga — bedaŭrinde por la sciuroj, (sciurinoj), rolantaj en la baletoj mi ne havis avelon, — (nu ne skuaduvian honeste blankan kapon, Onklino, mi nur ŝercis,) nu ĉio ĉi okazis jaŭde, sed vendrede vespere jam kuregis la vaporĉevalo, kun 80-kilometra rapideco al la norda arkto kaj en la ŝtalveturilo sidis kaj poste kuŝis via plej simpatia nevo. Jes, mi estis. Venis la nokto kaj venis la mateno. Mi estis jam 500, 600, 800 kilometrojn malproksime de Stockholm, mi vojaĝis tra belegaj pezaĝoj, mi denove vidas mian vojon, rigardu, la abiaro maldensiĝas, la betularbaroj forkuregas

kaj kiam ni denove proksimiĝas al la maro, ili denove rejuniĝas, la vagonaroj inspire grimpas sur altaĵon kaj ni vidas arĝentan riveron, blankan serpentuman akvon. Ruĝaj domoj, grizaj bestoj, blankmakulaj nigraj bovinoj sereniĝas el la verdo de la abiaro kaj el la melankolia brunflavo de la arbustoj kaj arboj. Mil kilometrojn de Stockholm! Ni estas en norda Svedlando. Mi rigardas la geografian karton, nur iom-iom da distanco kaj jen la sorĉa cirklo, la arkto.

Oktobro! Mi venis en malĝusta tempo, mi vidos nek la belegan noktmezan sunon, nek la eĉ pli belan polusan lumon. Sed eble mi revenos, mi volas reveni. 1200 kilometroj, proksimume mi duobligis la distancon de Budapeŝto kaj nun mi estas en la plej norda sveda mar-urbo, en Luleå, kie mi estis invitita de la loka grupo por paroli pri la hungara ebenajo, — ĉi tie, en la regno de la norda lumo....

Sed kedu Onklino, absolute homformaj estaĵoj akceptas min, jes, speciale mi estas kontenta pro la revido de simpatia samideanino, kiu estas konata al mi el Stockholm kaj kiu ankaŭ en la »sovaĝa nordo« ne perdis sian eŭropan aspekton kaj kiu estas mia impresarino. Nu, vi pensis, ke en tiu regiono nur dormemaj eskimoj sidadas, ankaŭ mi diris tion al miaj geamikoj, sed ili tuj reciprokis la komplimenton, demandante, ĉu ankaŭ mi estas unu el la fama cigana raso, kies filoj monopolas la teritorion de Hungarlando. Ne, Onklino, ankaŭ ne ĝon mi ne vidis, nur iom da malvarma vento, polusa vento de la najbareco — blovadis, cetere mi vidis belege situitan urbeton, kie mi vidis same belajn lernejojn, kiel en la aliaj partoj de Svedlando, (kiu rajte povas fieri pri sia lerneja kulturo), mi vidis majestan ruĝan preĝejon kaj mi aŭdis la samajn plendojn pri la krizo, kiuj estas aŭdeblaj en ĉiu parto de la mondo. Tamen mi ne nur aŭdis ĉi tie pri la danĝero de la mondo, sed mi eĉ renkontis vid-avide la Krizon. Afabla samideano gvidis min al la eksporthaveno kaj tie mi vidis la Fantomon. La Fantomo dancis tie sur la supro de la kilometrojn longaj fermontoj, mi vidis en unu amaso 3 000 000 da tunoj. bona, utila fer-amaso kaj de du jaroj el tiu amaso tre malmulta kvanto estis fortransportita de la oceanŝipoj, kiuj nun-



Nomada tendara lernejo.

tempe malofte vizitas la belegan havenon. La modernaj arganoj, kiuj dum ok horoj tri grandajn ŝipojn povas plenigi per varoj, orfe dormetas en la ruĝa brilo de la malvarmeta aŭtuna posttagmezo; ne estas pli, ol 3 gradoj, iom mi sentas la blove rajdantan froston, sed la vidaĵo estas ne forgeseble bela kaj melankolia. Norda bildo, kiun oni povas neniam forgesi. Kvazaŭ mi vidus la vesperon de la tuta mondo, granda grandega melankolio kuniĝas en mi.

Vespere ni trinkas kafon. Onklino, la sveda kafo ne estas tiom nigra, kiel la nia, sed mi povas aserti, ke ĝi ege superas la hungaran kafon. Iom forta ĝi estas, sed tre bona. La kafo vigligas la langojn kaj en amika societo ni babiladas pri nordo kaj sudo. La unua temo estas iom delikata. Estas iom malfacile skribi pri tio, sed mi ekprovas, eble mi sukcesos priskribi iom sen grandaj skandaloj. La junuloj en la ĉirkaŭaĵo de la urbo, post festenoj, aŭ aliaj solenaĵoj, ne iras ĉiam hejmen, sed ili, kun la konsento de junulino, kiu estas al la koncerna junulo simpatia (kaj kun familia aprobo) pasigas la nokton en la domo, kie la simpatia junulino loĝas, kaj tiu ĉi invito rilatas ne nur la domon, sed tiun meblon, kie la simpatia junulino kutimas dormi. Kaj ne ruĝiĝu, Onklino, vi devas scii, ke tiu afabla invito rilatas nur ekskluzive ripozon kaj neniu miskomprenas kaj misuzas tiun ĉi permeson. — Mi mem ne havis okazon konvinkiĝi pri tiu afero, sed mi parolis kun miskompren-

ema junulo, kiu ne sukcesis komprenigi la mison. Kaj post tiu aserto mi devis kredi. Nu mi devas almeti, ke tiu ĉi kutimo estas absolute loka kaj izolita. Vi plendis, ke lastfoje mi senigis vin de la plejparto de via imago pri la norduloj, eble nun mi iomete kontentigis vin.

Ni estas en la proksimo de la laponoj. Laponoj, nordaj cervoj kaj neĝkampoj. Nu la atendita neĝo ne alvenis — ĉiam neĝas jam la unuan de oktobro, sed nordajn cervojn mi povis vidi. Pri tiu besto oni rakontas, ke ĝi estas tre kaprica, kolereza estaĵo kaj dum la veturigo ofte ekkoleras, kaj tiam la lapono, kies senrada veturilo estas tirata de la cervo, devas renversi la veturilon, kaŝi sin sub ĝin kaj tiamaniere defendi sin kontraŭ la piedbatoj de la furioza besto. Mi mem ne rimarkis tiajn inklinojn ĉe la cervoj, ili sciigis pri mia estado kun la plej aristokrata indiferenteco, malgraŭ tio, ke estis inter ili kelkaj, kiuj laŭ la kurbiĝo de la nazoj ne povus atingi altan karieron en Germanujo. — Dankon, pro viaj salutoj, Onklino. Niaj parencoj, la laponoj, fartas bone kaj mi povas aserti, ke nek aspekte, nek lingve la parenceco kun vi estas rekonebla. Mi almetas kelkajn bildojn. Sed tamen estas unu rilato, kie mi trovis grandan similecon inter la laponoj kaj hungaroj. Mi vidis laponajn art-industriaĵojn, kiuj frapante similas la hungarajn paŝtist-skulptaĵojn. Speciale similas la lignaj ujoj, per kiuj oni ĉerpas akvon. Ĉu tiu simileco devenas el la komuna

prapatrujo? Iliaj vestoj estas tre pitoreskaj kaj ilia vivo estas vere inda por studi iom pli fundamente, sed mia »viken-do« estis tiom mallonga. Eble ili estas la lastaj nomadoj de Eŭropo. Kaj min frapis pleje io, kio karakterizas ne la laponojn, sed la svedan kulturon. Kun la nomadaj tendoj kune vagadas la nomada lernejo, kies instruistoj ricevas altan salajron de la sveda ŝtato, por ke ili povu ĝui la kulturon plej plene, se jam tendas ilin la vagabonda vivo. Vi povas vidi la etajn laponidojn antaŭ la lernejo sur la 1-a paĝo de la kovrilo), en kiu ili kaŭradas ĉirkaŭ la kaŭranta instruisto kaj pleniĝas de scienco. Inter la laponoj ne estas analfabeto. Gloron al Svedlando! Jes, kion vi volas aŭdi ankoraŭ, ke la infanoj, kiel ĉe ni la bestoj, havas sonorilon sur la loko, por ke ili pli facile estu retrovitaj, se ili devojiĝas en la senfinaj arbaroj? La sono havas multoblan gravecon en tiu ĉi vivo. La laponoj havas longe longajn melodiojn, sen vortoj kaj tiuj melodioj estas kompreneblaj por ili. Oni havas individuajn melodiojn, kiujn ĉiuj konas kaj kiuj akompanas la laponojn ĝis la morto. La lapona kadavro restas kelkfoje monatojn en provizora neĝkavo kaj nur printempe, okaze de la unua preĝeja vizito oni transdonas la mortinton al la fina kvieto. Cetere ankaŭ en la alia parto de Svedlando oni ne enterigas tiom rapide, ol en nia lando, en la malproksimaj lokoj kelkfoje forpasas du semajnoj, kiam la familianoj vizitas la preĝejon kaj okazas la enteriga ceremonio. Parolante pri tiu ĉi temo mi aŭdis iun historieton, kiun mi rerakontas al vi, rimarkante ke mi ne garantias la aŭtentikecon: »Edzino mortis. Dum la portado la ĉerkoportanto faligis la ĉerkon kaj la virino, kiu estis nur ŝajnmortinto, vekigis. Nu, estis granda ĝojo. Sed post ses monatoj la edzino denove mortis kaj tiam la funebra edzo tre bele petis la ĉerkoportantojn, ke ili estu pli singardemaj...« (Se mi rememoras la okazajon, kiun mi mem vidis en Budapeŝto, kiam iu oficisto agoniis kaj lia edzino plozege demandis: »Ĉu vi ne rekonas min, Johano«, kaj la mortinto remalfermis siajn okulojn dirante: »Bone mi konas vin, vi maljuna aĉulino.« — nu, se mi rememoras tiun okazajon, tiam mi devas preskaŭ kredi ankaŭ tiun historion.)

Sed vere mi ne volas forrabi vian dor-

Al la anoj de la instruista kurso, okazinta en Östhammar dum la pasinta somero!

Malgraŭ mia promeso mi ne povis dissendi ĝis nun la protokolojn pri la kurso, pro tio, ĉar kelkaj ankoraŭ ne sendis al mi siajn skribaĵojn. Mi esperas, ke mi ricevos baldaŭ tiujn. — Mi kore dankas ĉiujn, kiuj bonvolis sendi al mi artikolojn pri la infankursoj kaj post iom da tempo mi faros el ili resumon. Kaj samtempe mi uzas la okazon sendi koraĵajn salutojn al la partoprenintoj kaj dankas ilin pro la afablaj leteroj.

Dr. F. Szilágyi.

mon per miaj fantomhistorioj. Alian fofon mi daŭrigos per pli gajaj priskriboj de la belega Nordlando, kie vi povas revidi dum la somera mondkongreso vian fidelan nevon

Francisko.



Patrino lapona.

**Bulteno n-ro 2.**

Novembro 1933.

Pri represo en la esperantista gazetaro ni insiste petas.**Estas devo de la esperantogazetaro fari la eblon por la sukceso de la universalaj kongresoj.****Oficiala invito:** Sveda Trafika Asocio kune kun Sveda Esperanto-Federacio.**Adreso de L.K.K.:** Fredsgatan 4, Stockholm.**Poŝta ĉekkonto:** N-ro 50443, Stockholm.**Bankkontoj:** Svenska Handelsbanken, Stockholm 16; Sundsvalls Enskilda Bank, Fredsgatan 4, Stockholm.**Kotizoj:** Ordinara kotizo estas 25:— sved. kronoj.*Frupagantoj* (ĝis 31 marto 1934) pagos nur 20:— sved. kr.*Malfrupagantoj* (post 1 julio 1934) pagos 30:— sved. kr.*Junuloj* (malpli ol 16-jaraj) 5:— sved. kr.*Blinduloj senpage.***Kongresejo:** Laborkunsidoj kaj fakaj kunvenoj okazas en la sveda parlamenta domo, la solenaĵoj en la koncerta domo, la balo en la urbodomo de Stockholm.**Donacoj** por la kongresa kaso ni danke akceptas.**Blindula kaso:** Por partopreno de blinduloj ni danke akceptas mondonacojn.**Fakaj kunvenoj:** Pri anoncigo de fakaj kunvenoj kiel eble plej baldaŭ ni petas.**Mangô:** En Stockholm ekzistas tre multaj popularaj, bonaj restoracioj, kie oni povas ricevi tagmanĝon por 1:— sved. kr. En luksaj restoracioj tagmanĝo por 2:50.**Loĝejoj:**

A: luksaj hoteloj — Sved. kr. 10—20.

B: komfortaj hoteloj — kr. 7—10.

C: simplaj hoteloj — kr. 5—7.

D: modestaj hoteloj — kr. 4—5.

E: komunaj loĝejoj por 6 ĝis 20 personoj — kr. 1,25—2.

Trinkmono enkalkulita.

Fervoja rabato en Svedlando:

Por la vojaĝo al la kongreso estas jam interkonsentite pri 25% rabato.

Favoraĵoj: Ĉiu kongresano ricevos senpage la belan svedan Esperanto-Gazeton ekde la aliĝo. Do, ju pli frue vi aliĝas, des pli multe vi gajnas!**Reklamafiŝo** pri la kongreso estas havebla senpage ĉe LKK. Formato 100 × 70 cm.**Oni vivas malmultekoste** en Stockholm nuntempe. Speciale favore estas por eksterlandanoj, kaŭze de la momenta valutofalo de la sveda krono. Ekz. 1 sved. kr. = 1 angla ŝil.; 0:24 dol.; 0:70 germ. m.; 0:85 svis. fr.; 0:40 ned. flor.**Aliĝu** do tuj por profiti el la valutodiferencoj!

PROVIZORA PROGRAMO

Sabate 4 aŭg.: Solena malfermo de la kongreso en la koncerta domo de Stockholm.

Poste interkonatiga vespero en la plej granda restoracio de Stockholm: La salonoj de Berns.

Dimanĉe 5 aŭg.: Diservoj diversspecaj en ĉefaj preĝejoj de Stockholm.

Poste mallonga ekskurso al la bela arkipelago ekster Stockholm.

Vespere koncerto en la Koncerta domo de la fama ĥoraro Dalekarlia sub gvido de la konata sveda komponisto Hugo Alfvén.

Lunde 6 aŭg.: Malfermo de la somera universitato de rektoro Sam Jansson. Famaj sciencistoj svedaj kaj alilandaj jam promesis partopreni. La somera universitato havos du sekciojn: a) pri sveda popolo kaj moroj, b) kun ĝenerala enhavo. (Somera universitato kaj ĉiuj kunsidoj okazos en la sveda parlamenta domo.) Unua kunsido de UEA.

Fakkunsidoj.

Vespere oficiala akcepto de la urba magistrato per solenaĵo en la Blua salono de la Urba domo.

Marde 7 aŭg.: Somera universitato. Kunsidoj. Vespere naciaj dancoj kaj speciala programo en la subĉiela muzeo, la belega Skansen.

Merkredo 8 aŭg.: Somera universitato. Kunsidoj. Vespere teatra prezentado.

Ĵaŭde 9 aŭg.: Tuttaga ekskurso al Upsala, Sigtuna, Skokloster, Mariefred ktp. laŭplaĉe.

Literatura kabaredo.

Vendrede 10 aŭg.: Somera universitato. Kunsidoj.

Vespere internacia balo en la Blua salono de la Urba domo.

Sabate 11 aŭg.: Malfermo de la kongreso.

De ĉie - pri ĉio - al ĉiu.

»VERDA MONDO» (Japanujo): La oktobra numero enhavas salutan artikolon al sveda princo Karlo juna, kiu faris dumonatan viziton al Japanujo kaj kiu studis Esperanton. Li estas petita akcepti la eldonaĵojn de la Asocio Ootomo kaj akcepti kelkajn reprezentantojn por la esperantistoj.

El la septembraj numeroj de »Heroldo de Esp.»: En Hungarlando dum la skoltjamboreo, mil personoj rigardis la vesperan fajron de la skoltesperantistoj. La kunvenon de la Skolta Esp. Ligo vizitis ĉ. 200 personoj. — En alia septembra numero ni legis ĉarman poemeton, kiu estas speciale interesa, ĉar ĝia titolo estas multe pli longa ol mem la poemo. Jen la titolo: »Poemo de Ootomo no Sukune Jakamoĉi al fraŭlino Sakanoŭe no Ooiracume.» Kaj jen la poemo: »Se ie estus — surtere land', senhoma, — mi tie nestus — kun ci en viv' duopa, — ja for de ĉiu kroma.

Ni legis la aŭgustan-septembran kaj oktobran numerojn de »Esperanto». Pro lokomanko ni devas esti tre koncizaj kaj raportoj nur pri tio, ke la »Touring Club de Portugal» decidis starigi »Esperantistan Sekcion». Edmond Privat proponas frapantan devizon en la propagando de Esperanto, speciale ĉe ekspozicioj, kie Esp. havas specialan lokon: »Nacilingvo por enlanda uzo, Esperanto

Oficialaj

glumarkoj

nun aperis. Prezo:

por 20 markoj

sved. kr. 0:50 aŭ 2

respondkuponoj.

Haveblaj ĉe



LOKA KONGRESA KOMITATO. ✕

por internacia uzo.» El la artikolo de la aŭstra ministro, F. Stockinger ni citas nur kelke da vortoj: »Elirinte mem el la komerca profesio mi bone scias taksi la gravecon de viaj celadoj kaj iliaj efikoj je la tutmonda komercpolitiko, ĉar mi estas konscia pri tio, ke komuna mondlingvo ankaŭ kaŭzos internacian interkonsenton en la ekonomiaj rilatoj de la mondo.» En la artikolo pri la neŭtraleco la verkisto akcentas, ke ĉiu opa ano de UEA estas libera pensi kion li volas, sed samtempe atentigas pri la pretendoj de la esperantista realpolitiko, kiuj ne permesas sensencaĵojn. — La fama ŝipkompanio »Norddeutscher Lloyd» eldonis Esp. lingvan prospekton.

El »La Esperanta Gazeto» ni citas la jenan problemon de fraŭlino, kiu estas kontoristino ĉe la senarmiga konferenco: »Kian ĉapelon mi aĉetu, kun plumo aŭ kun kanono?»

»SENNACIECA REVUO»: »Mia konsilo nin okupu per tiaj demandoj, kiel fari el nia lando taŭgan loĝlokon.. ne enmiksiĝu en disputoj kaj hazardludado en aliaj landoj (Citaĵo el la nova verko de Upton Sinclair.)

El la »POLA ESPERANTISTO» (aŭg.-sept.): »Pola Telegrafa Agentejo publikigas en sia ĉiutaga bulteno interesajn novaĵojn, ricevitaĵojn per Esp. aŭ interesajn priesperantaĵojn. Materialon sendu al f-ino Weinstein, vd. de UEA, Warszawa, Leszno 99.

El la »GERMANA ESPERANTISTO» ni citas nur la titolon de la sola esperantlingva artikolo: »La mondo atentu, parolas Adolf Hitler!» (Oktobro.)

»FLANDRA ESPERANTISTO» (Sept): Kelkaj ciferoj el la mondmilito: Dum la 4 militjaroj 11 milionoj estis mortigitaj, t.e. unu post ĉiuj 13 sekundoj. El la mono elspezita por la milito oni povus doni al ĉiu loĝanto de Eŭropo domon kaj malgrandan bienon, sed krom ili povus ricevi similan havaĵon aliaj kontinentanoj.

»PROGRESO» (Praha. - Okt.) La anoncita radio-kurso en Brno ne okazos dum la aŭtuno, sed dum la printempo.

